

## Letero al iu edukministro aŭ lernejdirektoro *Jen modelo*

Loko, dato

Altestimata,

Vi respondecas pri granda kvanto da lernantoj, studentoj ; vi devas esplori pri la plej bezonataj scioj por ili, pri la plej efikaj metodoj, pri la plej altnivelaj instruistoj en via Ŝtato, provinco, urbo, lernejo, por venigi ilin por viaj gestudentoj. Vi konas la rajtojn de la lernantoj akiri plej aktualajn informojn pri nia mondo kaj ĝiaj multnombraj facetoj. Pro la fakto, ke la tagoj havas nur 24 horojn kaj ke la lernkapablo kaj energio de la lernantoj estas limigitaj, pro la fakto, ke viaj financaj rimedoj ne estas enormaj, vi devas foje fari elektojn. Tion ni plej bone komprenas.

Estas fakto, ke multaj lernantoj volas aŭ devas lerni la anglan, aŭ la ĉinan, aŭ la francan, kaj deciĉas al tiu studado 10 000 horojn en sia lerneja kariero. Giganta investo en tempo kaj energio ; giganta lernado per memorkapablo pro la multnombraj esceptoj en tiuj lingvoj. Kun kiu rezulto ? Vi certe scias. Ni hodiaŭ petas vin doni UNU HORON en la programo de viaj lernantoj, por ke ĉiuj viaj lernantoj havu la okazon aŭdi pri la Internacia Lingvo Esperanto.

Ni preparis aron da dokumentoj por tiu leciono. Iu persono povas facile ricevi tiujn dokumentojn kaj fari simplan prezenton en la klaso, por ke ĉiu lernanto sciu, kio estas Esperanto kaj al kio utilas ĝian lernadon. La prezenton povas fari iu instruisto, iu studento, kiu ricevos la dokumentojn kaj preparos la lecionon, aŭ vi povas venigi esperantiston el la regiono aŭ el la urbo. Ni estas je dispono. Se tia UNU leciono pri Esperanto okazos, la studentoj havos kelkajn bazajn sciojn pri la nuntempa maljusta lingva situacio en la mondo, kaj pri tiu alia lingvo, kaj povos mem decidi, ĉu valoras la lernado de ĝi jes aŭ ne. Bonvolu konsideri, ke nia peto estas tre modesta kaj simpla, kaj senpaga.

Por konkretigi tiun projekton, bonvolu ekribi kun...[nomo], [antaunomo], [retadreso], [telefono], [poshtadreso]

Kun espero, ke vi komprenos nian celon helpi al vi alporti vastan scion al viaj studentoj, ni salutas vin respektoplene.

Xy

Prezidanto de la loka klubo

Direktoro de EO-centro

Au .....